



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Pilo-Press

estas ĉiam abonebla **Redonanto/Herausgeber:**
ankaŭ dum somero! Ludwig Pickel
Jara abonkotiĝo Postfach 2113
30,- GM D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

N-ro 27/77 - 6 jul 1977
Aperas ĉiusemajne

Poŝtĉekkonto
Nürnberg 819 56 - 851

SAT- Kongreso en Augsburg

Augsburg (pp) - Kiel ni jam informis kelkfoje, la 50-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos de la 30.7. ĝis 5.8.77 en Augsburg. Ankoraŭ estas tempo por aliĝi, speciale por esperantistoj de Bavario. Korespondadreso de la kongreso estas: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8901 Steppach.

La kongresa inaĝuro okazos dimanĉe, la 31-an de julio, je la 10-a horo, en la urbodomo de Augsburg (Oberer Fletz).

Salutvorto

La prezidanto de la Distrikta Parlamento (Bezirkstag) de Svabio dediĉis al la kongreso jenan salutvorton:

La internacia kongreso de la laboristoj-esperantistoj denove kunsidas en nia distrikta ĉefurbo Augsburg. Mi rajtas transdoni komisie de la Distrikta Parlamento de Svabio sincerajn bonvenigajn salutojn.

Sendese la esperantistoj klopodas pri la lingva kaj homa kompreniĝo inter la popoloj. Ili vidas sian taskon en la unueco de la homar-familioj kaj reciproka alproksimiĝo. En tio kuŝas la vera kunhomaĵo. Ĝi estas de alta valoro por la humaneca hombildo. Kvankam ne estas eviteblaj malfacilaĵoj en ĉi tiu strebado, tamen sole jam la luktado de la unuopulo pri harmonio kaj kompreniĝo estas popolinterliga kaj sufiĉe socia, por ke al ĝi ne povas esti rifuzata ankaŭ la publika rekono.

Mi deziras al la kongreso plenan sukceson en la senco de praktika popola interkompreniĝo, kaj al ĉiuj partoprenantoj agrablan restadon en Augsburg.

Günzburg, Julio 1977

sign. D-ro Georg Simnacher
Prezidanto de la
Distrikta Parlamento Svabio

Nova enscenigo de Pola Esperanto-Teatro

Varsovio (pp) - Pola Esperanto-Teatro je la nomo de Antoni Grabowski intense preparas nun enscenigon de nova teatraĵo en Esperanto. Temas pri la dramverko de J. Cwojdzinski "La Hipnoto", kiu siatempe furoris en diversaj landoj. La aŭtoro de la teatraĵo estas pola dramverkisto, vivinta eksterlande.

La dupersona teatraĵo dum 90 minutoj streĉe tenas la emociojn de spektantoj, kiuj sekvas la aventurojn de kuracisto kuracanta per la hipnoto kaj de ŝia ĉarma pacientino, kiu ankaŭ atendas kurac-procedojn, kiuj eble ne proksimas al la hipnoto, sed "kuracas".....

La traduko de la teatraĵo: Z. Dobrzyński kaj Kalina Pieńkiewicz, lingva revizio: Andrzej Pettyn, traduko de la kanzonoj kaj versaĵoj: A. Pettyn. La prapremiero esperantlingva de la teatraĵo okazos kadre de la UK en Rejkjaviko, al kiu la teatron invitis la estraro de UEA. Valoras ĉe-okaze substreki, ke la Pola Esperanto-Teatro turneas ankaŭ tra Eŭropo, prezentante teatraĵojn en la pola lingvo kaj en Esperanto, en F R Germanio, Hispanujo, Francujo, Aŭstrio, Jugoslavio kaj aliaj landoj.

Esperanto ĉe regiona renkontiĝo

Frankfurt (pp) - Kadre de regiona renkontiĝo "Hessentag", okazinta de la 18-a ĝis la 22-a de junio 1977 en la sudheslanda urbo Dreieich, okazis i.a. vasta ekspozicio. En la "tendo de la unuiĝoj" la Naturamikoj dediĉis parton de sia stando al la falkgrupo "Esperanto", kaj Manfred Führer kun helpo de malmultaj konvene instalis eksponaĵojn. Dum la tuta semajno ĉiutage 9 horojn funkciis la ekspozicio kaj kelkaj niĉoj da diversaj informfolioj estis disdonitaj al interesuloj post alparolo. La vendado de Esperanto-vino dum la lastaj du tagoj helpis vekti intereson kaj faciligis la kontaktiĝon kun preterpasantoj.

Estus dezirinde, ke ĉie okaze de tiaj manifestacioj Esperanto sin prezentu al la publiko. Valoras la penon! Ritt

Semajnfina renkontiĝo kun muzika vespero

Herzberg (pp) - De la 4-a ĝis la 6-a de novembro 1977 okazos en Herzberg/Harz semajnfina renkontiĝo kun riĉenhava programo en kaj pri la Internacia Lingvo. Elstaras muzika vespero, en kiu partoprenos pl-uraj ĥoroj kaj solistoj. Pastro Kindler-Triksini prezentos magian programon kaj celebros diservon. Esperanto-ekspozicio kun provlecionoj informos pri Esperanto. En la programo ne mankos amuzaĵoj kaj distraĵoj.

Esperantistoj, junuloj, interesuloj, progresemluloj kaj komencantoj, ĉiuj estas bonvenaj.

La unuaj ses eksterlandaj gastoj, kiuj sin anoncas, ricevos senpagan loĝadon kaj manĝon. Do valoras ankaŭ por eksterlandanoj sin anonci kaj partopreni!

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe: Esperanto-Societo, Grubenhagenstr. 8, D-3420 Herzberg/Harz.

80 esperantistoj ĉe la Baltmara Printempo

Koszalin (pp) - La finalan konkuradon de la traduk-konkurso je la nomo de Kazimierz Bein (KABE) gajnis s-ano Jan Szurman el Dzierzoniów, la du duajn lokojn egale okupis: s-ano Stéfania Palica el Szczecin kaj s-ano St. Malek el Lodzo.

Kadre de la Dua Baltmara Printempo Esperantista en Koszalin pri la vivo de K. Bein kaj lia traduklaboro prelegis red. A. Pettyn, pri interlingvistikaj demandoj prelegis red. J. Uśpięski kaj pri la kontribuo de la Esperanto-elsendoj al la evoluigo de la ĵurnalisma Esperantolingvo prelegis Jerzy Grum. La konkurson pri belega legado gajnis Zdena Matyková el Hradec Kralove en Ĉeĥoslovakio.

Partoprenis 80 esperantistoj el 7 landoj, plejparte el Pollando, GDR, Danlando kaj Svedujo. Kadre de la aranĝo oni spektis teatraĵon "Rakonto pri libereco" en la traduko de A. Pettyn, kiun enscenigis la teatro "Rondo" el Słupsk. Krome en la kastelo de Darłowo oni spektis lum-prezentadon "La reveno de princo Eriko", ankaŭ en la traduko de A. Pettyn. Kelkaj interesaj ekskursoj tra la regiono, Esperanto-ekspozicio en la Kulturdomo de Koszalin kaj recitalo de arioj kaj kantoj kompletigis ĉi tiun belan semajnan aranĝon, kiun oni planas daŭrigi ankaŭ en la sekvontaj jaroj.

Not-kajeretoj kun varba teksto

Szczecin (pp) - PEA kunlabore kun la vojaĝoficejo GROMADA eldonis not-kajeretojn kun la pollingva teksto: "Jezyk ESPERANTO ułatwia turystyce" (La lingvo ESPERANTO faciligas la turismon) kaj kun apuda esperantlingva teksto "KUN ESPERANTO tra MONDO". La kajeretojn oni disponigas al turismaj agantoj kaj vojaĝoficejoj. S-ino Józefa Dołgowska, kiu iniciatis ĉi tiun eldonon, nun preparas alian pri korespondaj kursoj.

UEA kaj la Eŭropa Komunumaro

Nürnberg (pp) - En n-ro 22/77 ni detale raportis pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso. En tiu raporto ni antaŭmenciis la paroladon de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, dum la kongresa inaŭguro.

Ni nun ricevis la aŭtentikan tekston de tiu parolado, kiu ni publikigas en n-ro 3/77 de Eŭropa Esperanto-Revuo. En ĉi tiu numero de Pilo-Press ni publikigas el tiu parolado jenajn citaĵojn:

"Kion faras profesoro Frank ĉi tie aliaj faras aliloke en aliaj medioj. Usono nun havas sian fakan organizon de universitatoj, kiuj okupiĝas pri Esperanto-studoj. En Sovetunio la lingvo estas inter la temoj, kiujn pritraktas la Akademio de Sciencoj, ekzistas katedroj aŭ lektoradoj de Esperanto en pluraj landoj, bibliotekaj kolektoj de Esperanto-libroj estas fondataj aŭ kreskas tra la mondo. Tiu influo al la sciencistoj, la fakuloj, estas trege grava, ĉar al la specialistoj sin turnadas normale la politikistoj, kaj se ili estas kontraŭ nia afero, la ebleco de nia sukceso estas multe malpli grandaj.

Sed samtempe necesas influi la politikistojn, influi la publikon (kaj ja la du aferoj estas kunligitaj). Ni ĝojas ke en la temaro de la nuna kongreso rolas demandoj pri vortaroj, demandoj pri lerniloj kaj instruiloj. Ni devas plivasten etendi nian reton, plivaste instrui la lingvon, kaj plivaste informadi inter simpatiantoj pri ĝia potencialo kaj ĝiaj meritoj. Inter la multaj bonaj paŝoj faritaj lastatempe laŭ tiu direkto estis la propono, ke oni fondu Eŭropan Esperanto-Asociion, kiu en malstrikta federacio ligu la landojn de la Eŭropa Komunumaro kaj tiel fariĝu oficiala voĉo de Esperanto antaŭ la tielnomataj eŭropolitikistoj. Jam la Eŭropa Esperanto-Centro, kiu ekzistas de kelkaj jaroj, faras paŝojn sur tiu kampo, kaj ĉi tie en Paderborn la Eŭropa Klubo, interalie okupiĝas pri demandoj de eŭropa unueco kaj la utiligo de Esperanto.

Kompreneble Universala Esperanto-Asocio, ĉiel organizo politike neŭtrala, ne povas preni pozicion pri la meritoj aŭ mankoj de la Eŭropa Komunumaro. Sed ĉar ĝi ekzistas, ĉar temas pri internacia agado, ni povas almenaŭ labori por konvinki ĝin utiligi Esperanton. Samon ni farus, se levigus la okazo ĉe aliaj regionaj organizoj; samon ni jam faras ĉe plej diversaj neregistaraj organizoj de plej diversaj tendencoj. UEA ekzistas unuavice por antaŭdenigi la utiligon de Esperanto en ĉiuj internaciaj sferoj. Ni kuraĝe interveni kie la oficiala utiligo de Esperanto troviĝas (aŭ reale aŭ potenciale) sur la tagordo."

Interlingvistiko en Venecio

Sekve de iniciato de d-ro Fabrizio Pennacchietti, profesoro pri semida filologio en la Venecia Universitato kaj esperantisto, la rektoroj de la Universitato de Venecio kaj de la Universitato "Eötvös Lorand" de Budapeŝto, kie Esperanto estas instruata de prof. István Szerdahelyi, ĵus subskribis konvencion, por ke, en la kadro de kultura kunlaboro, dum venontjara majo okazu en Venecio simpozio pri Interlingvistiko, kun aparta konsidero al Esperanto. Rajtos partopreni la aranĝon nur italaj kaj hungaraj sciencistoj.

La libro de la semajno

La akvariinfanoj, sciencfikcia romano de Willem A. Verloren van Themaat

Pormato 16,2 x 20,8 cm, broŝ., 64 p. kun ilustraĵoj, 9,50 GM

Nikcia literaturo en Esperanto malabundas, ĝiaj ŝatantoj do kun ĝojo kaj intereso legos ĉi tiun unikajn sciencfikcian romanon pri abortigoj, pri eksperimentoj je embrioj, pri infana fabriko aŭ infana azilo, pri graveda viro ktp. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Legantoj demandas

S-ro Pritz Schottenhammer, München, skribis: En "Esperanto" mi legis hodiaŭ la vorton "Tesaŭro", sed mi ne trovas tiun ĉi vorton, eĉ ne en PIV. Ĉu vi scias kion ĝi signifas en germana lingvo?

Respondo de PP: Laŭ Mackensen "Neues Wörterbuch der deutschen Sprache" la vorto Thesaurus signifas "Schatz, Wörterbuch, Sammelwerk". La verba signifo origina estas "mon-amasigado". Vd. ankaŭ "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj" p. 150. "Tesaŭro" en Esperanto do signifas "kolekto, trezoro, vortaro".

Jan Klimek

Pensoj kaj...pensetoj

Mi estas por diktaturo kaj por diktado: Oni diktu, kion fari!

+++++

Ino kun pezaj korp-atutoj, sed de leĝera konduto. Kontraŭdiro en si mem!

+++++

Alarmo inter la bestoj: Atenton! Ne besto iras! Iras homo!!

+++++

Esperanto en radio

"Intertempe proksimiĝis la horo de la parolado de s-ro Pitlik. Precize je la 7.50 h la inĝeniero komencis serĉi la interrilaton kun Praha, akordigante la aparaton je la anoncita ondlongo de Praha (1150 m). Unue ni ne aŭdis ion alian krom la jam diritaj malagrablaj sonoj. Minuto post minuto pasis sen tio, ke niaj atendoj realiĝis. Fine, post ses minutoj, ekakŭdiĝis la voĉo de s-ro Pitlik....lia parolado ĝenerale estis bone komprenebla. Nur malmultajn vortojn mi ne komprenis, kiam por momento intervenis atmosferaj aŭ radiaj perturboj....." - Jen citaĵo el raporto pri aŭskultado de Esperanto-elsendo el la jaro 1924, la komenca tempo de radiofonio (Germana Esperantisto, n-ro 2/1924, p. 26.)

Hodiaŭ la aŭskultado de Esperanto-elsendoj estas pli facila kaj malpli komplika, kvankam ankoraŭ hodiaŭ regas perturboj kaj ĝenoj.

Varsovio estas posttagmeze, je la 16,30 h, sur ondo 41 m, kaj matene, je la 6,00 h sur ondo 49 m estas bonege aŭdebla, preskaŭ sen iuj ajn perturboj. Nur la vespera mezonda elsendo, je la 22,30 h, estas iomete ĝenata de najbaraj sendiloj. - Pro la feria tempo la deĵorantaj geredaktoroj devas multe labori. Nuntempe la ĉefan laboron devas fari redaktorino Milada Szveto kaj red. Jerzy Grum, helpata de gast-redaktoro A. Pettyn. Dum la pasintaj Esperanto-Ekspresoj regule estis disaŭdigata la rubriko "Novaĵoj de Pilo-Press". Ofte ankaŭ la Esperanto-anguletoj kadre de la germanlingva programe estas kvazaŭ mini-soneldonoj de Pilo-Press. Dankon al Varsovio pro la popularigo de Pilo-Press kaj la bona reciproka kunlaboro. - La programeroj de la posttagmeza marda programo (5.7.77, 16,30) estis: Novaĵoj; komentario: La Sejma aprezado de la nacia mastrumado; felietono: Pola kaj ĉeĥoslovaka kunlaboro en la industrio.

Radio Vatikano: El la elsendo de la 19.6.77 ni eksciis ke al la IKUE-kongreso en Ĉenŝtoĥova aliĝis 449 personoj, ke la polaj instancoj donis la oficialan permeson aranĝi la kongreson, ke dum la kongreso oni uzos prokazan poŝtstampon kun E-teksto.

Radio Vieno. Post la semajna komentario de d-ro Alfred Macher oni povis aŭdi interesan raporton de s-ro Bronec pri sia restado sur la insulo Malto. S-ro Bronec fariĝis dumviva honora membro de la Malta Esperanto-Asocio, koran gratulon!

Svisa Kurtonda Radio. La prelegoj de d-ro A. Baur ĉiam denove malkaŝas nekonataĵojn pri Svislando, ĉi-foje pri la imposta sistemo!